

Heinrich Heine,
The Lorelei

tradukita de L. W. Garnham

Heinrich Heine,
Lorelej

tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof

Heinrich Heine,
Lorelej'

tradukita de Leopold Elb

Heinrich Heine,
Lorelay

tradukita de Hans-Georg Kaiser

Tiu traduko estas poste iom modifita de aliujoj, ne estas la origina traduk-versio de Leopold Elb.

I do not know what it signifies.
That I am so sorrowful?
A fable of old Times so terrifies,
Leaves my heart so thoughtful.

Ne scias mi, kial subita
malgaj' en la koro
naskiĝis;
el tempo jam enterigita
legendo al mi reviviĝis.

Ne scias mi, kial mi estas
Malgaja en la kor'.
Antikva fabelo restas
Por ĉiam en mia memor'.

Min kaptas malgaj'
en la koro,
pro kio tia trist'?
Fabel' el antikva foro
ne lasas de mi kun
persist'.

The air is cool and it darkens,
And calmly flows the Rhine;
The summit of the mountain hearkens
In evening sunshine line.

Jam malvarmetiĝas
l' aero,
la Rejno mallaŭte
babilas,
per oro de l'sun' en
vespero
la supro de l' monto
rebrilas.

Vespero jam ekmalheliĝas,
Fluadas la Rejn' en
trankvil',
La supro de l' monto
lumiĝas
En vespersuna bril'.

Aere fridetas, trankvilas,
malhelas jam la Rejn'.
La monto surpinte
brilas
vespere en rava scen'.

The most beautiful Maiden entrances
Above wonderfully there,
Her beautiful golden attire
glances,
She combs her golden hair.

Plej belan knabinon
mi vidas:
en ora ornamo brilante,
sur supro de l' monto
ŝi sidas,
la harojn mistere
kombante.

Belega knabino jen tronas
Kun ora juvelar',
La belan vizaĝon
kronas
Mirinde la ora harar'.

Tre ĉarma feino sidas,
jen supre por ador';
la ora ornamo ridas;
ŝi kombas harojn el or'.

With golden comb so lustrous,
And thereby a song sings,
It has a tone so wondrous,
That powerful melody rings.

La oran kombilon ŝi movas
kaj kantas tra l' pura
aero,
kaj forto mirinda sin trovas
en tiu ĉi kant' de
l'vespero.

Ŝi uzas kombilon el oro
Kaj dume kantas ŝi.
Mirige tuŝas al koro
Sorĉiga la melodi'.

Ŝi kombas per ora kombilo
kaj kantas kun pasi';
mirigas min la elbrilo
kaj forto de l' melodi'.

...

...

...

...

The shipper in the little ship	Ŝipet' iras sur la rive- ro,	Kaj sopiregon eksen- tas	Ŝipisto ŝipeton gvi- das,
It effects with woe sad might;	ŝipisto ekstremis de l' kanto,	Ŝipisto dum sia ve- tur';	lin kaptas ve' de ek- zalt'.
He does not see the rocky slip,	kaj blinda por ĉiu danĝero	Rifaron li ne priaten- tas,	Li ja la rifojn ne vi- das',
He only regards dreaded height.	rigardas li al la kan- tanto.	Al monto rigardas li nur.	li vidas nur supren sen halt'.

I believe the turbulent wa- ves	Ha, baldaŭ ŝipisto la bela	Mi kredas, ke dronos finfine	Mi kredas, ke ondoj tiras
Swallow the last shipper and boat;	perdiĝis sub l' akvo- turnado;	Ŝipisto kun sia boat', Kaj tion kaŭzis feine	la ŝipon funden de l' Rejn';
She with her singing craves All to visit her magic moat.	ĝin Lorelej' faris kruela, per sia mirinda kan- tado.	La Loreleja kantad'.	kaj tio de l' kant' eli- ras de Lorelaj-siren'.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en la Anglan de L. W. Garnham.*

Arg-2-14 (2003-10-11
23:04:57)

L.W. Garnham, Bachelor of Arts, LEGENDS OF THE RHINE; mentioned in: A Tramp Abroad. Vol 1-2. Leibzig: Tauchnitz, 1880 Band I, Mark Twain 1880

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, *1859-12-15 - †1917-04-14).*

Arg-2-565 (2009-10-30
16:15:09)

*Tiun ĉi traduk-
version mi prenis
el retejo <http://www.esperanto.mu.ru/Kolekto/Lorelej.html>.*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD ELB (†1912-08.04).*

Arg-2-71 (2005-02-03
19:06:30)

La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, *1954-05-21).*

Arg-2-564 (2005-02-03
19:18:09)